# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

No 18 Aprilo 1926

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al „ESPERANTO" ☆ Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENÈVE

*TEKSTO:* La XXX-a kunsido de la Administra Konsilantaro. — La Konferenco de Laborministroj pri la 8-hora Konvencio. La nova konstruaĵo de la Internacia Labor-Oficejo. — La rezultoj de la adepto de la okhora tago en industrio. — La konfirmo de internaciaj laboraj konvencioj en 1925. — Franclando kaj la Konvencio pri plumboblanko. — Estonio kaj la Konvencioj. La Internacia Labora Organizaĵo kaj Migrado. — Laborleĝdono en Palestino. — Progreso pri konfirmo de konvencioj.

## La XXX-a kunsido de la Administra Konsilantaro.

La trideka kunsido de la Administra Konsilantaro de la Internacia Labor-Oficejo okazis en Genève de la 28-a al la 30-a de Januaro 1926.

### Tagordo de la Konferenco 1927.

Oni ekzamenis la demandojn por enmeti en la tagordon de la Deka Kunsido de la Konferenco, kunvenonta en 1927. La Konsilantaro decidis unuanime enmeti la demandojn pri libereco je asociado kaj pri asekuro kontraŭ malsano.

Oni ankaŭ decidis, ke la tagordo enhavu trian demandon, kaj tri proponoj estis diskutitaj: antaŭforigo de akcidentoj, jaraj ferioj kun salajroj, kaj metodoj por starigi minimuman salajron en iuj neorganizitaj industrioj, en kiuj salajroj estas escepte malaltaj.

Per 13 voĉoj kontraŭ 7 la Konsilantaro elektis la lastan demandon, kiu estis diversfoje proponita, kiel konvena temo por diskutado.

### Modifo de la regularo.

La Konsilantaro ekzamenis proponojn pri modifo en la Regularo de la Konferenco.

Sekve de malfacilecoj okazintaj en lasttempaj kunsidoj pri la nomo de membroj de komitatoj, diversaj proponoj estis prezentitaj de S-ro de Michelis, Itala Registara Delegito, kaj de la mastra grupo. Oni adoptis proponon de Sir Louis Kershaw, Delegito de la Hinda Registaro, kiu konservas la aŭtonomion de la registara, mastra kaj laborista grupoj pri elekto de komitatanoj, sed rajtigas ĉiun delegiton ĉeesti la kunvenojn de komitatoj, sen voĉdonpovo.

### Membreco de la Konsilantaro.

S-ro de Michelis anoncis, ke la Itala Registaro intencis peti konsultan opinion de la Konstanta Juĝistaro de Internacia Justeco pri interpreto de Artikolo 393 de la Kontrakto de Versailles, koncerne la kondiĉojn, laŭ kiujn reprezentantoj de mastroj kaj laboristoj estas elekteblaj por la Administra Konsilantaro.

### Proceduro de la Konferenco.

Daŭrigante la diskutadon pri modifo de la Regularo, la Konsilantaro ekzamenis la proceduron per du legadoj de konvencioj kaj rekomendoj, proceduron enkondukitan per provizoraj reguloj en 1924. Tiu proceduro elvokis iujn kritikojn dum la kunsido de 1925 kaj estis resendita al la Konsilantaro por plua ekzameno.

Oni adoptis, kun malmultaj ŝanĝoj, per 16 voĉoj kontraŭ 6, raporton de la Komitato pri Regularo, kiu estos prezentata al la Konferenco dum la kunsido en 1926.

Laŭ la proponoj faritaj en tiu ĉi raporto, la Konferenco ne plu devus redecidi pri Projekto de Konvencio aŭ Rekomendo jam adoptita en antaŭa kunsido. Ĝi diskutus ĝenerale, en unu kunsido, demandon povantan formi la temon de Konvencio aŭ Rekomendo, kaj decidus en la plej proksima kunsido pri la definitiva teksto de la Projekto de Konvencio aŭ Rekomendo.

Rilate al la tri demandoj enmetitaj en la tagordon de la Kunsido de 1927, oni decidis, ke la konsiderado de la demando pri minimuma salajro rigardu precipe, sed ne sole, laboron faritan en la hejmo.

Pri asekuro kontraŭ malsano, la Konsilantaro opiniis, ke la ekzameno de tiu demando povu ampleksi la traktadon de eksterlandaj laboristoj.

Rilate la demandon pri libereco je asociado, oni decidis unuanime, ke la diskutado de tiu temo estu kiel eble plej larĝa kaj ampleksa.

### Intelektaj laboristoj kaj la Konferenco.

La Internacia Konfederacio de Intelektaj Laboristoj esprimis al la Konsilantaro la deziron, ke oni sugestiu al la Registaroj, ke ili aldonu al la delegitaro al la Konferenco spertulon nomitan de la Konfederacio. La Konsilantaro opiniis, ke estas preferinde, lasi al la koncernataj personoj, atentigi iliajn respektivajn registarojn.

### Aplikado de Konvencioj.

La Konsilantaro ekzamenis rezolucion proponitan de la Brita Registaro, celantan havigi pli precizajn informojn pri la apliko de internaciaj laboraj konvencioj. Oni decidis unuanime proponi, ke la Konferenco nomu specialan komitaton, por konsideri metodojn por utiligi kiel eble plej bone kaj plene la informojn komunikitajn de la diversaj registaroj, laŭ Artikolo 408 de la Traktato de Versailles, pri la apliko de Konvencioj konfirmitaj de tiuj registaroj.

### Publikeco.

Oni diskutis la petojn faritajn de la reprezentantoj de la gazetaro, inkluzive la Internacian Asocion de Ĵurnalistoj rajtigitaj ĉe la Ligo de Nacioj, pri la enlaso de la gazetaro al la kunvenoj de la Konsilantaro. Oni decidis per plimulto, ke la kunsidoj estos ĝenerale publikaj, sed ke ili povos fariĝi privataj en iuj difinitaj okazoj. Antaŭ la voĉdono la laborista grupo sin deklaris unuanime favora al kompleta publikeco por la diskutadoj de la Administra Konsilantaro.

### La 8-hora Konvencio.

La Reprezentanto de la Brita Registaro anoncis la konferencon de Laborministroj, kiu poste kunvenis en London.

### La kompetenteco de la Organizaĵo.

La Mastra Grupo prezentis al la Konsilantaro peton, ke demando estu submetata al la Konstanta Juĝistaro de Internacia Justeco, ĉu la Internacia Labora Organizaĵo estas kompetenta por pritrakti la laboron de la mastro mem. Kvankam la plimulto de la membroj opiniis, ke la Organizaĵo estas kompetenta pri la aludita temo, kaj deklaris, ke la nuna decido devas ne konsistigi precedenton, la Konsilantaro decidis, komuniki la peton al la

Konsilantaro de la Ligo de Nacioj, laŭ Artikolo 14 de la Packontrakto, difinante jene la demandon submetotan al la Juĝistaro: Ĉu la Internacia Labora Organizaĵo estas kompetenta por redakti kaj proponi regulojn, kiuj, celante certigi la protekton de certaj salajruloj, rilatas samtempe kaj akcesore al la persona laboro de la mastro?

La plej proksima kunsido.

Oni decidis, ke la plej proksima kunsido de la Administra Konsilantaro okazos la 21-an de Aprilo 1926.

## La Konferenco de Laborministroj pri la 8-hora Konvencio.

Estas ĝenerale sciate, ke Konferenco de la Ministroj de Laboro de Granda Britlando, Franclando, Germanio, Belgio kaj Italio kunvenis en London dum la semajno de la 15-a al la 20-a de Marto por klopodi akordiĝi pri komuna interpreto de la Projekto de Konvencio pri Laborhoroj balotita en Washington en 1919. La fina celo de tiu diskutado estas, kompreneble, forigi la malfacilecojn, sentitajn de iuj el la nomitaj ŝtatoj, kontraŭ la konfirmo de la Konvencio.

Ĝuste kiam la Bulteno iras al la presilo, alvenas al Genève la informo, ke akordo estas farita pri ĉiuj punktoj, kaj ke la konferenco plene sukcesis. La germana reprezentanto montriĝis tre konsentema kaj lia sintenado grande kontribuis al la sukceso akirita.

Je la fino de la Konferenco la ĉeestantaj laborministroj subskribis protokolon, esprimantan interkonsenton pri diversaj punktoj en iuj el la artikoloj de la Projekto de Konvencio. La protokolo ankaŭ enhavas la jenan klaŭzon:

Estas plue konsentite inter la reprezentantoj de la registaroj partoprenantaj en la Konferenco, ke ili raportos al iliaj respektivaj registaroj la konkludojn, supre esprimitajn, kiujn la Konferenco estas povinta atingi, por ke tiuj registaroj, kiuj ne ankoraŭ konfirmis la Konvencion, povu, konsiderante la konsentojn atingitajn, daŭrigi la ekzamenon de la demando pri la konfirmo de la Washingtona Konvencio.

## La nova konstruaĵo de la Internacia Labor-Oficejo.

La konstruado kaj aranĝado de la nova domo de la Internacia Labor-Oficejo estas preskaŭ finita, kaj la personaro jam estas transloĝinta. Lokita apud la limo de la urbo sur la bordo de la lago, la nova konstruaĵo estas de arĥitekturo tre simpla kaj similas multe pli al vasta laborejo ol al la palaco, pri kiu oni tiel ofte parolis en la gazetaro. La unuformeco de tiu longa rektangulo (80 × 30 m) estas nur rompita de vitrita turo sur unu el ĝiaj flankoj, kiu servas por intense lumigi la bibliotekon.

La teretaĝo enhavas krom la lokejoj de diversaj servoj la kunvenejon de la Administra Konsilantaro, ĉambregon kiu meritas specialan atenton. Ĝi estos tute ekipita per donacoj de diversaj registaroj. La lignaĵoj kaj la mebloj estas donitaj de Granda Britlando, Hindio kaj Kanado. La Franca Registaro donis tapeton de Gobelins, la Itala la bindaĵojn de la libroj, kiuj troviĝas en la ĉambro, Greklando kaj Bulgarlando donis tapiŝojn, Japanlando keramikaĵojn; Finnlando, Hispanio kaj Nederlando donis pentraĵojn. Svedlando la meblaron de la ĉambro de la prezidanto, Queenslando (Aŭstralio) la meblaron de la vestiblo de la unua etaĝo.

En la vestiblo de la teretaĝo troviĝas du belaj bronzaj statuoj de Meunier, donitaj de la Belga Registaro.

La diversaj fakoj de la Oficejo estas distribuitaj tra la teretaĝo kaj tri superaj etaĝoj, en ĉambroj sufiĉe grandaj kaj bone lumigitaj, en kiujn oni eniras el larĝaj koridoroj, ankaŭ bone lumigitaj per fenestroj donantaj vidon sur interna korto, ornamita de herbobedoj kaj fontano. En la kvara etaĝo troviĝas restoracio kaj kunvenejo por la personaro.

La konstruaĵo estas provizita per liftoj kaj centra hejtado, kaj la instalado de la biblioteko estas plej kompleta kaj perfekta.

La transloĝigo de tiel grava institucio kun tiel vasta kaj netaksebla dokumentaro ne estas facila afero, sed ĝi fariĝis rapide kaj senkonfuze, kaj la tuta personaro nun efike laboras en la novaj ĉirkaŭaĵoj.

## La rezultoj de la adopto de la okhora tago en industrio.

La Internacia Labora Revuo de Decembro 1925 kaj Februaro 1926 enhavas interesan studon de profesoro Edgard Milhaud, kiu kondukis la Enketon de la Internacia Laboroficejo pri Produktado, pri la rezultoj de la adopto de la okhora tago en industrio.

La aŭtoro citas informojn eltiritajn de diversaj fontoj, montrantajn, ke la okhora tago rezultigis en pluraj landoj la reorganizon de labormetodoj kaj plibonigon de ekipadoj. Prof. Milhaud diras, ke produktado povas esti subtenata, post malpliigo de laborhoroj, nur per intensigo de laboro kaj teknikaj plibonigoj, kaj ke „atendi, ke la pliigita produktiveco de la laborantoj tute kompensu malpliigon de laborhoroj, estas erari pri la reala ekonomia signifo kaj amplekso de tia malpliigo, kaj precipe de la okhora labortago“. Laŭ lia opinio la valoro de tiu reformo konsistas en la fakto, ke ĝi stimulas samtempe la energion de la laborantoj kaj la iniciativon de la entreprenantoj. Tiel ĝi servas al duobla celo, kontribuante al la progreso de la homa aganto kaj lia produktiveco kaj ankaŭ al progreso pri ekipado kaj organizado.

Prof. Milhaud donas la rezultojn de la sperto en Ĉeĥoslovakio, Francio, Usono, Svislando kaj aliaj industriaj landoj, kiuj reorganizis iliajn labormetodojn kaj plibonigis ilian ekipadon, por kompensi la malpliigon de laborhoroj. Estas pruvita fakto, ke en industrioj, kiuj komprenis la necesecon de tiaj ŝanĝoj, okazis pliigo de produkto, kaj ke en aliaj la adopto de la okhora labortago montriĝis potenca instigo al teknikaj plibonigoj. La aŭtoro apogas sian opinion sur raportoj de la Brita Komitato pri la sano de Municilaboristoj kaj aludas la atestaĵojn de la Prusa Industria Inspektantaro kaj la raporton de la Sveda Labora Departemento.

La aŭtoro ankaŭ citas plurajn faktojn kaj opiniojn, kondukantajn al la konkludo, ke la malpliigo de laborhoroj jam produktis sur la fizikaj, intelektaj kaj moralaj kondiĉoj de la laboristoj la bonajn efikojn, kiujn oni povus atendi de ĝi, tio estas: malpliiĝo de laceco, kun pli bona sano kaj pli malofteco de akcidentoj; pli riĉa familia kaj socia vivo; disvolviĝo de edukado; malkresko de alkoholismo kaj ke el ĉio tio rezultas intensiĝo kaj pli bona kvalito de la laboro mem. Tiuj bonaj rezultoj estas ĝis nun pli malpli kontraŭagitaj de iuj fizikaj kaj psikologiaj efikoj de la milito, kiuj nature malaperos iom post iom.

Prof. Milhaud konkludas, ke la rezultoj de la Enketo pri Produktado koncerne la efikojn de la okhora labortago estas ĝenerale kuraĝigaj. Ili montras, ke la reformo ne nur okazigis moralan, socian kaj intelektan progreson, sed ankaŭ favoris teknikan progreson, stimulante plibonigojn de ekipo kaj organizo, kaj kondukis al pli racia kaj ekonomia utiligo de la produktaj povoj de la homa aganto. Tamen ne estos eble juĝi definitive pri la kontribuo de tiu reformo al la evoluado de la homaro, antaŭ ol estas pasintaj pluraj jardekoj.

## La konfirmo de internaciaj laboraj konvencioj en 1925.

La tuta nombro de la konfirmoj de internaciaj laboraj konvencioj registritaj de la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj, kiuj estis 142 je la fino de 1924, estis 185 je la fino de 1925. Do 43 novaj konfirmoj estis komunikitaj de diversaj registaroj dum la jaro 1925.

La Washingtona Konvencio pri la okhora labortago estis konfirmita de du pluaj ŝtatoj: Ĉilio kaj Latvio; la Konvencio pri plumboblanko de tri ŝtatoj: Bulgario, Ĉilio kaj Rumanio. La primaj konfirmoj de Germanio, Francio, Ĉilio kaj Aŭstralio estis registritaj. Krom tio la konfirmo estis rajtigita en 24 okazoj de la kompetentaj aŭtoritatoj, kaj en 33 aliaj okazoj registaroj petis al parlamentoj rajtigon por konfirmi konvenciojn. Tiuj ciferoj montras sufiĉe grandan aktivecon dum la pasinta jaro kaj esperigas novajn rezultatojn dum la proksimaj monatoj.

## Franclando kaj la Konvencio pri plumboblanko.

La Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj registris la 19-an de Februaro 1926 la konfirmon de la Projekto de Konvencio pri la uzo de plumboblanko en pentrado (Genève 1921) de la flanko de Franclando. Tion sekvis la publikigo, la 31-an de Januaro, de du leĝoj, unu rajtiganta la konfirmon kaj la alia modifanta la kodon pri laboro, por efektivigi la Konvencion.

## Estonio kaj la Konvencioj.

La Estonia Parlamento voĉdonis du leĝojn, kiuj fariĝis efikaj la 17-an kaj la 18-an de Decembro 1925 respektive, pri semajna tagripozo en industriaj entreprenoj kaj pri deviga kuracista ekzameno de infanoj kaj junuloj okupataj surŝipe. Tiuj leĝoj efektivigis la Konvenciojn pri tiuj demandoj, kiujn Estonio jam konfirmis.

## La Internacia Labora Organizaĵo kaj Migrado.

Depost ĝia kreo la Internacia Labora Organizajo dediĉas grandan parton de sia agado al la problemo pri migrado. Tio apartenas al la devoj komisiitaj al la organizaĵo de la Packontrakto.

La antaŭparolo de la Parto XIII de la Packontrakto enmetas, inter la rimedoj por plibonigi laborkondiĉojn, „la reguligon de la labormerkato, la forigon de senlaboreco, la protekton de laboristoj laborantaj en fremdaj landoj.“

Artikolo 427 de la Kontrakto, difinante la metodojn kaj principojn por la reguligo de laborkondiĉoj, kiujn ĉiuj industriaj komunumoj devas preni por apliki, tiom kiom iliaj cirkonstancoj ĝin permesas, diras, ke „la normo leĝe starigita en ĉiu lando pri laborkondiĉoj devas certigi justan ekonomian traktadon al ĉiuj laboristoj laŭleĝe loĝantaj en la lando.“

Kvankam migrado ne estis entenita oficiale en la tagordo de la Unua Kunsido de la Konferenco, kunveninta en Washington en 1919, ĝi estis pritraktita rilate la demandon pri forigo de senlaboreco. La Projekto de Konvencio pri Senlaboreco, balotita en tiu kunsido, postulas, ke laboristoj apartenantaj al unu Ŝtatmembro de la Organizaĵo, kaj laborantaj en la teritorio de alia Ŝtatmembro, ricevu la saman kompenson laŭ eventuala asekuro kontraŭ senlaboreco kiel la laboristoj apartenantaj al tiu Ŝtatmembro. Rekomendo pri la sama temo pritraktas la rekrutigadon de laboristaroj en unu lando por labori en alia, kaj alia Rekomendo koncernas reciprokecon je traktado de eksterlandaj laboristoj.

En 1921 Internacia Komisiono pri Elmigrado, konsistanta el ĉirkaŭe 20 spertuloj el pluraj landoj, kunvenis en Genève. Pli ol 30 rezolucioj, bazitaj sur kompromiso inter tre diversaj tendencoj, estis balotitaj. Ili rilatas al: statistikoj, internacia kunordigo de rimedoj por la protekto de elmigrantoj, okupado de elmigrantoj, egaleco de traktado por eksterlandaj kaj naciaj laboristoj, ŝtata kontrolo de elmigradagentoj, kolektiva rekrutigo de laboristoj en fremdaj landoj, dekalkulaĵoj de salajroj pro antaŭpagoj al elmigrantoj, rimedoj por la forigo de la komerco pri virinoj kaj infanoj, inspekto de elmigrantoj antaŭ enŝipiĝo, higieno de elmigrantoj, ĝenerala kaj teknika edukado, apliko de leĝoj limigantaj elmigradon kaj enmigradon.

En la kunsido de Genève en 1922 la Internacia Labora Konferenco pritraktis unu el la punktoj de la programo projektita de la Komisiono kaj unuanime voĉdonis Rekomendon pri „komunikado al la Internacia Labor-Oficejo de statistikoj kaj aliaj informoj pri elmigrado, enmigrado, repatriigo kaj transiro de elmigrantoj.“

La Konferenco en la kunsido de 1925 sin okupis plue je la demando pri egala traktado de naciaj kaj eksterlandaj laboristoj kaj balotis Projekton de Konvencio pri „Egaleco de traktado por naciaj kaj eksterlandaj laboristoj pri kompenspago pro akcidentoj.“

En ĝia plej proksima kunsido en Genève en Majo 1926 la Konferenco pritraktos „la simpligon de la inspekto de elmigrantoj surŝipe“.

La graveco de demandoj pri elmigrado kaj enmigrado, rilate al la tasko de la Internacia Labora Oficejo, necesigis la kreon, de la komenco, de speciala teknika fako pri migrado. La estro de tiu fako (la Sekcio pri Migrado) estas S-ro L. Varlez, antaŭe profesoro en la Universitato de Gent kaj prezidanto de la Genta Senlaboreca Kaso, eksprezidanto de la Internacia Asocio pri Senlaboreco. La Administra Konsilantaro decidis antaŭ du jaroj nomi konstantan komitaton de spertuloj pri migrado. Tiu komitato, kun kiu kunlaboras ĉirkaŭ 100 spertuloj en pluraj landoj, komencis labori je la fino de 1925. La Sekcio pri Migrado sin tenas en kontakto kun oficialaj kaj privataj organizaĵoj pri elmigrado kaj precipe kun la Internacia Konferenco de privataj organizaĵoj por la protekto de migrantoj.

La Internacia Laboroficejo jam eldonis plurajn studojn pri migrado. „Elmigrado kaj Enmigrado“, resumo de leĝoj kaj internaciaj kontraktoj kaj konvencioj, koncernantaj 76 ŝtatojn, aperis en 1922, kaj la „Monata Raporto pri Migrado“ resumas regule faktojn pri elmigrado kaj enmigrado, pritraktante interalie internaciajn konvenciojn, regularojn en diversaj landoj, agadon de oficialaj kaj privataj organizaĵoj, enketoj, ktp.

Du verkoj pri statistikoj jam aperis, nome: „Metodoj por prepari statistikojn pri elmigrado kaj enmigrado“ (eldonita en 1922) kaj „Migradaj movadoj, 1920—1923“ (eldonita en 1925). Tiu ĉi studo reprezentas la oficialajn informojn transdonitajn al la Oficejo pri 60 landoj aŭ teritorioj. Ĝi ampleksas transmaran kaj kontinentan migradon, la kvanton, komparajn statistikojn kaj direkton de migradaj movadoj, karakteraĵojn de migrantoj, ktp. Studoj aperis en la „Internacia Labora Revuo“ pritraktantaj interalie migradon en Germanio, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio.

La Internacia Labor-Oficejo sin okupas nuntempe, kunlaborante kun la Amerika Konsilantaro por Ekonomia Serĉado (American National Board of Economic Research), je enketo pri oficialaj migradaj statistikoj antaŭ 1920, kies rezultatoj estos eldonataj dum la jaro.

## Laborleĝdono en Palestino.

Kun la kreskanta industria disvolviĝo de Palestino, oni pli kaj pli atentiĝas pri kompenspago pro laborakcidentoj.

Laŭ „Davar“, la organo de la Ĝenerala Konfederacio de Juda Laboro en Palestino, okazis 61 akcidentoj, el kiuj 18 estis mortigaj, dum la periodo de la 25-a de Junio al la 25-a de Oktobro 1925. Tamen ĝis nun neniu leĝo fariĝis pri kompenspago pro laborakcidentoj, kaj klopodoj por starigi komuna asekuran kason kontraŭ laborakcidentoj ne sukcesis. Sekve la Ĝenerala Konfederacio de Juda Laboro decidis starigi Asekuran Kason kontraŭ Laborakcidentoj, kiel sendependa fako de ĝia Malsanasekura Kaso.

La sama gazeto diras, ke la Registaro de Palestino preparas Ordonon pri Protekto de Laboristoj, kiu estos sendita al la Ministerio por la Kolonioj en London por aprobo.

